

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 23 - Aprilo - Majo - Junio 1993

ISSN 0986 - 1181



La 15-a Regulo de la Fundamento

Fine de debato pri ambaŭ formoj : kaj Unuiĝinta Naciaro, kiu demonstras la priskribivon de Esperanto kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke nia lingvo kapablas doni nomon konforma al tiuj nomoj konataj en la diversaj lingvoj, la plimulto ŝajne opiniis pli bona la duan formon!*

Efektive se la Internacia Lingvo estas arta kaj "arte-fara", ĉu la plej bona arto, se rekrei propran nomon, ne estas rekrei ĝin laŭeble konforma al tiuj ekzistantaj en aliaj lingvoj? Konforma al tiu formo, kiun rekomendas la 15-a Regulo de la Fundamento! Ŝajne nur tia elemento povas esti stabila en la lingvo, ĉar pri ĝi oni ne bezonos tamtami, ke ĝi estis elektita de tia kaj tiu fame konata nacia komitato! Nur tia elemento povos elŝpruci sub la plumo aŭ el la buŝo de ne avertita samideano! Kaj ĉar ideale ni povas esperi, ke estos multe pli da estontaj Esperantistoj ol da nunaj, tiu konsidero ne povas ne havi grandegan gravon. Ne teni tian konsideron do estus defetismo!

*Japanoj mem hezitas** pri la nomo de sia mon-unito : Jenio aŭ Eno? Kiu preferindas? Nu, ĉiu parkere scias, ke en la Japana ekzistas nur la tri silaboj ja, jo, ju sed nek je, nek ji! Kaj ĉiu povas do konkludi, ke Jenio ne devenas de Japana formo, almenaŭ ne rekte! Tamen ĝi ja devenis de iu apartaĵo de Japana fonetiko; aŭ, se ne, do eble de alia lingvo, orienta aŭ ne! Japanaj etimologoj serĉos kaj klarigos. Sed ĉiuokaze tio neniel gravas por Esperanto.*

*Por ĝi sufiĉas konstati, ke tiu formo estas internacia : oni ja trovas la formojn yen, jen, iena . . . en plej diversaj lingvoj, ĝis tia grado, ke la internacia "simbolo" por tiu mono estas ĝuste Y, ne-Esperanta sed internacia litero nomata igrek***; oni eĉ antaŭlonge kreis specialan signon, preskaŭ internacian ideogramon, nome iun trastrekitan Y (Y), kiun oni povas trovi sur multaj skribmaŝinoj aŭ en la literaroj de multaj mensvaroj! Pro tiaj internaciecaj faktoj ŝajne oni firme elektu en Esperanton la ĉie konatan nomon Jenio! Ĉiu alia nomo nur povus esti noca por la Internacia Lingvo : oni ne rekonas en Esperanto la nomon, kiun oni konas en ĉiuj lingvoj!*

La 15-a Regulo de la Fundamento estas hodiaŭ la plej grava regulo de nia lingvo. Ankaŭ la malplej bone konata kaj aplikata! Se ne kontestata! Ni bedaŭru la kontestantojn! Sur ilin refalu la misaj konsekvencoj!

D-ro André ALBAULT

*) "Monato", 1993 : n-ro 5.

**) T. NAKAMURA : Enciklopedieto Japana, 1964. — YAMASAKI Seikō : Etimologia Vortareto Pragmata de Esperanto, 1991.

***) En iuj lingvoj nomata *ipsilon* aŭ *upsilon*. Sed ĝi estas ankaŭ la nomo de la responda Greka litero; do evitenda.



Ĉu -n post -iĝi?

En Aprilo okazis kongreso-kunvenoj de SAT-Amikaro, kiuj daŭris dum kvin tagoj en Normandio : tre interesaj renkontiĝoj inter geesperantistoj kun bonnivela scipovo de la Lingvo Internacia!

En inter multaj interparoladoj aparte elstaris tiu demando de instruistino : «Ĉu post verbo en -iĝi povas sekvi la akuzativa marko -n?» La demando efektive estas apriorie tre surpriza : "iĝi" estas sufikso, kiu principe per si mem jam supozigas transiron de iu stato al alia, kaj sekve akuzativa signo ŝajnas unuavide superflua; kutime la rezulta gramatika funkcio estas predikativa rilate al la sunjekto . . . Sed kiam la radiko de la kunmetitaĵo kun -iĝ sugestas ankaŭ al-movon, plej ofte post prepozicio aŭ en adverba formo oni retrovas la almovan -n verŝajne pro redundeco* . . .

Posta konsulto tra la PLENA ANALIZA GRAMATIKO kaj la PLENA ILUSTRITA VORTARO rikoltis jenajn frazojn de D-ro L. L. Zamenhof : "Ĉiuj pretiĝas al nia komuna festo . . . Grupiĝi ĉirkaŭ sia standardo . . . Kliniĝi antaŭ falsaj aŭtoritatoj . . . Ne dekliniĝi de sia vojo . . . (Sed kun la akuzativo) Li iom ĵetiĝis malantaŭen . . ." Kiu lasta citaĵo elmontras, ke la akuzativo rezultas ne el "iĝi" sed el la radiko "ĵet-". Kaj tion konfirmas la PLENA ANALIZA GRAMATIKO, precizigante, ke "iĝi" estas esprimilo de mediala** voĉo, do "en si mem netransitiva", kaj tial la akuzativo povas rezulti nur el la signifo de la radiko uzata kun "-iĝ-".

Responde al kritiko*** de S-ro Félix Garcia Blásquez, laŭ kiu mankas en LA LETERO «citaĵoj de la Fundamento, kiam oni pritraktas gramatikajn temojn», traserĉo de ekzemploj en la Fundamenta Ekzercaro (§ 39 kaj 40) montriĝis vana; kaj, unu fojon pli, dank'al Profesoro Gaston Waringhien en PLENA ILUSTRITA VORTARO kaj en PLENA ANALIZA GRAMATIKO troviĝis ĝusta respondo al lingva demando.

J. T.

*) **redundeco** : parto de gramatikaj formoj, kiu nur ripetas esprimon de rilate jam implicita aŭ esprimita per alia gramatika formo.

) **medialo : verba voĉo, kiu prezentas agon kiel koncernantan nur la subjekton sen la bezono substreki volon (kiel en la refleksivo) aŭ menci - eĉ subkompreniĝi - aganton (kiel en pasivo).

**) *Venezuela Stelo*, recenzo pri LA LETERO n-ro 15, aperinta en n-ro 49, p. 10.



Fakvortoj en ekonomio, la faklingvo en Esperanto, la Terminologia Centro de UEA, kaj la Akademio de Esperanto

Daŭre okazas teknikaj inventoj kaj la lingvo bezonas vortojn por ili. La granda kesto por enpaki varojn en martransporto nomiĝas "kontenero", kvankam "kestego" decus por Esperanto, formita kiel "komputilo" - kontraŭ kio oni asertas, ke ĝi apenaŭ rilatas al "komputi".

Aperas ankaŭ novaj okazaĵoj kiel la abundiĝintaj informado kaj distriĝoj per gazetoj, revuoj, filmoj, radio, televido : la "komunikiloj"; sed tiuj ja nur parte komunikas! Ili pli multe amuzas. Tamen "komunikiloj" fariĝis la fak esprimo en Esperanto. Sed por "sistem-luo" (ekzemple de aŭto) uziĝas la neologismo "lizingo".

La lingvoj transprenas siajn vortojn por novaj aĵoj aŭ fenomenoj el iliaj originoj. Iuj tradukiĝas ("longdistanca parolilo" = "telefono"), aliaj restas fremdaĵoj : "joint venture", "just-in-time". Ĉiu lingvo devas solvi tiun ĉi problemon. Iuj avancis en tiu procedo, aliaj vidas la taskon ankoraŭ antaŭ si. Tio validas por lingvoj firme establiĝintaj nur nun : inter ili la Estona, Latva, Litova, Vaska, Gaela, Kataluna kaj preskaŭ ĉiuj lingvoj de la Tria Mondo.

Esperanto estas ĝuste en tiu ĉi pozicio. Ĝi vivas en la nuntempo kaj ĝi devas esti kapabla priskribi sian tutan ĉirkaŭaĵon. Ĝi bezonas siajn fakvortojn, la terminojn. Tio ne estas voko krei neologismojn, sed pledo doni al ĉiuj fakaj kaj al novaj aparaĵoj iliajn precizajn nomojn.

Tiel ni moviĝas en la kampo de normigado de teknikaĵoj, de procesoj, kaj ankaŭ de la terminoj. Ĉi tie ĉio ĉi estas inter si firme ligita. Ke la vortoj estu saĝe adaptitaj, estas tasko de la terminologio. Do Esperanto orientiĝu terminologie.

Kiel en ĉiuj lingvoj de tre malgrandaj kolektivoj, la lingvaj kontaktoj en Esperanto estas malabundaj. Kontraŭe al tio en la naciaj lingvoj la ofta apliko ankaŭ de novaj terminoj zorgas pri rapida firmiĝo de la kompreno. Kion gazetoj multe uzas aŭ kion la televidaj novaĵoj ĉiutage mencias, tio enprofundiĝas ĉe la homoj. Por Esperanto la tasko estas multe pli malfacila.

Stabiligon de la terminoj en komerco, ekonomio kaj ekonomiko proponas la 9-lingva vortaro el 1974. Ĝiaj 2 800 fakvortoj devus esti nun ekster la diskutoj. Sed eĉ esenca nocioparo kiel "proponado kaj postulado" ne jam hejmiĝis en Esperanto, svarmas "ofertoj", "demando", "demandumo" ktp.

La specialistoj en la "Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo" (IKEF) klopodas pri aldonaj vortaroj : la "Ŝlosilvortoj de la Internacia Komerco" de la Internacia Ĉambro de Komerco en Bruselo (1989), la nova provtraduko de la EK-vortaro "Ekonomio, Financo, Mono" (EKOFIM).

Eblas fake labori per la helpo de tiuj terminaroj. Pri temoj el la ekonomio mi ofte prelegis dum la "Internaciaj Kongresaj Universitatoj" de la Universalaj Kongresoj de Esperanto, mi lekciis antaŭ studentoj de la "Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San-Marino, Berlin kaj Białystok, kaj mi verkis tri librojn : KONJUNKTUR-POLITIKO, ENTREPRENO, TRAFIKO.

UEA partoprenis en la klopodoj pri faklingvo, kaj ĝia instrumento estas la "Terminologia Esperanto-Centro" (TEC de UEA) fondita en 1987. Ĝia celo estas la stimulado de termin-verkado fare de specialistoj en la unuopaj fakoj ĉefe per konsilado. Konferencoj de TEC dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto informis ĉiujare pri ĝiaj agadoj, kaj ĝi ekprenis laborrilatojn al neesperantistaj normigaj institucioj. TEC ĝuste nun laŭ la peto de la Komitato de UEA resumis siajn farojn en raporto por UEA. Ĝi bezonas novajn kunlaborantojn.

La Akademio de Esperanto laboris multe por doni al la Esperantistoj iliajn fakvortojn (periodo de Akademiano Haferkorn). Grava materialo por la faka lingvo troviĝas en "Plena Ilustrita Vortaro" (PIV) kun sia ĉefaŭtoro Akademiano Waringhien. Nun la Akademia "Sekcio pri Fakaj Vortaroj" kolektas terminojn kaj Akademiano Eichholz ĵus eldonis la "Plenan Pekotekon 85-90" en tri volumoj kiel valoran vortmaterialon. El kelkfoje pluraj vortproponoj la uzanto povas mem elekti sian preferaĵon. Do multe da laboro okazas, sed mankas kunordiga efiko.

Kelkaj fakoj vivas kaj viglas en Esperanto, sed ĝenerale la faka lingvo postrestas malantaŭ la literaturo. Tio validas ankaŭ por la interesoj en la Esperantista publiko. Pravas tion la libromarkato en Esperanto, same la recenzado en la revuoj de la movado. TEC luktas kontraŭ siaj problemoj, la Akademio sin tenas en la malantaŭo.

Jen malforta flanko de Esperanto kaj vundebla punkto de ĝia movado. Aliaj lingvoprojektoj ensaltis kaj malbonfamigas Esperanton en la opinioj de eksteraj decidantoj. La volapük-simila "Glosa" dispropagandas sin, "Interlingua" reviviĝas. Al Esperantistoj oftigiĝas la demando : «Ĉu Esperanto povas esprimi tiun fakajn?»

Jes, ĝi kapablas! Sed ni Esperantistoj devas prizorgi la fakajn lingvaĵojn. Ĉiu devas mem trakti sian fakon en Esperanto. Por gvidi tiujn laborojn UEA nun iniciatis pri sia "lingvo-politiko", ĉar la Komitato de UEA akceptis dum sia kunsido de la Universala Kongreso en Vieno (1992) tian rezolucion. Ĝi mem en siaj organoj (Estraro, Komitato, eventualaj Komisionoj) kaj la sendependa kaj plene repektata Akademio de Esperanto, kaj laŭ siaj kapabloj la Terminologia Esperanto-Centro, devas nun realigi tiun esencan intencon.

NdlR : Kolego Werner Bormann pravas, atentigante nin pri la neceso urĝe aktivigi la fakon pri Terminologio en Esperanto. Jam multe estis farita per diversaj terminaroj, per la "Internacia Komerca-Ekonomia Vortaro en Naŭ Lingvoj" kaj la "Plena Pekoteko 85-90" en tri volumoj. Sed nun venis ja la momento kunordigi la tuton eble laŭ la modelo en 9 lingvoj por igi ĝin tuj uzebla en la praktiko . . . des pli, ke Interlingua denove agitas asociojn, eĉ tian nomitan "Défense de la Langue Française"! (Defendo de la Franca Lingvo). — (JT)

HELPU!

Cele al ilustrado de *prelego pri tradukado* farota dum la Brazila Kongreso de Interlingvistiko kaj Esperantologio (Goiania, Oktobro 1993) mi petas alsendon

de nacilingvaj tradukoj de la poemo *LA KORVO* de *Edgar Allan POE*. Kompense mi povos sendi tri Portugalajn tradukojn de tiu poemo. — Leopoldo H. KNOEDT, Encontro das Iguas G 10, BR 42700-000 Lauro de Freitas, BA, Brazilo.

Ĉu karakteriza finaĵo ĉe primitivaj adverboj?

Du specoj

En Esperanto ekzistas du specoj de adverboj :

1. – derivitaj adverboj, kiuj havas finaĵon *-e*; la *-e* estas karakteriza finaĵo de derivitaj adverboj. Ekz-e, *flue*, *ĝoje*, *obstine*.

2. – primitivaj adverboj, kiuj estas vortoj difinitaj kiel adverboj – ili estas primitivaj vortoj – ili estas puraj radikoj – ili ne havas karakterizan finaĵon. Ekz-e, *nun*, *hodiaŭ*, *plus*, *tro*.

Derivaĵoj de primitivaj

Rilate al la primitivaj adverboj, oni faras derivaĵojn aldonante finaĵojn al ili. Ekz-e, *nuno*, *nuna*, *nuni*; *hodiaŭo*, *hodiaŭa*, *hodiaŭi*; *pluso*, *plusa*, *plusi*; ktp.

Primitivaj kun *-e*

Ekzistas naŭ primitivaj adverboj, kiuj finiĝas per la litero *e*, kvankam tiu *e*, en ĉi tiu kazo, principe, laŭ la difino de primitiva adverbo, ne devas, aŭ eĉ ne povas, esti karakteriza finaĵo. Tiuj naŭ primitivaj adverboj estas : *ne*, *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre*, *tre*, *volonte*.

Tiuj ne estas problemoj

Rilate al la primitivaj adverboj *ne* kaj *tre*, oni ne havas problemon. Ĉiuj gramatikoj kaj ĉiuj vortaroj konsideras ilin puraj radikoj – primitivaj vortoj. Iliaj derivaĵoj estas : *nea*, *neo*, *nei*; *trea*, *treo*, *trei*.

Malkonsento

Rilate al la primitivaj adverboj *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre* kaj *volonte*, oni trovas malkonsenton. Kelkaj gramatikoj kaj kelkaj vortaroj konsideras la vokalon *e* de tiuj sep primitivaj adverboj kiel finaĵon. Aliaj gramatikoj kaj aliaj vortaroj konsideras tiun vokalon *e* kiel parton de la radikoj.

Estas finaĵo

Por la homoj, kiuj opinias, ke la *-e* de tiuj sep primitivaj adverboj estas finaĵo, iliaj derivaĵoj estas : *nepra*, *nepro*, *nepri*; *ofta*, *ofto*, *ofti*; ktp.

Ne estas finaĵo

Por la homoj, kiuj opinias, ke la *e* de tiuj sep primitivaj adverboj ne estas finaĵo, tio estas, ke la *e* apartenas al la radikoj, iliaj derivaĵoj estas : *neprea*, *nepreo*, *neprei*; *oftea*, *ofteo*, *oftei*; ktp.

Laŭ Esperanta bezono

Ĉar Esperanto estas lingvo, kiu bezonas esti kiel eble plej regula, kohera, logika, konsekvenca, racia, kongrua, ktp., oni devas serĉi solvojn por ĝiaj polemikaj punktoj ĉefe laŭ tiu bezono. Tial mi kredas, ke oni povas solvi la prezentitan problemon per iu el la sekvantaj solvoj :

Solvo 1

Oni difinus tiujn sep primitivajn adverbojn kiel "Specialajn Primitivajn Adverbojn kun Karakteriza Finaĵo", tio estas, primitivaj adverboj, ĉar difinitaj kiel adverboj, kiuj havas finaĵon. Se oni faras tion, la sep Specialaj Primitivaj Adverboj kun Karakteriza Finaĵo *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre* kaj *volonte* havus radikojn, kiuj estus, respektive, *nepr*, *oft*, *parker*, *precip*, *spit*, *supr* kaj *volont*, kaj iliaj derivaĵoj, kohera laŭ la difino, estus : *nepra*, *nepro*, *nepri*; *ofta*, *ofto*, *ofti*; ktp.

Por ĉi tiu solvo oni bezonus modifi kelkajn vortarojn, kaj oni bezonus meti la *supre* cititan difinon en la gramatiko.

Solvo 2

Oni difinus tiujn sep primitivajn adverbojn, kiel *nepre*, *oft*, *parker*, *precip*, *spit*, *supr* kaj *volont*. Se oni farus tion, ili estus primitivaj vortoj – puraj radikoj. La derivaĵoj estus la samaj kiel en la solvo 1, sed pro alia kialo.

Por ĉi tiu solvo oni bezonus modifi ĉiujn vortarojn kaj ĉiujn gramatikojn.

La plej granda malavantaĝo de ĉi tiu solvo estas, ke oni havus kelkajn vortojn preskaŭ neprononceblajn.

Solvo 3

Oni daŭrigus difini tiujn sep primitivajn adverbojn, kiel *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre* kaj *volonte*, kaj, kohera pri la difino de primitivaj adverboj, oni derivus : *nepreo*, *neprea*, *neprei*; *ofteo*, *oftea*, *oftei*; ktp.

Por ĉi tiu solvo oni bezonus modifi iomete kelkajn malmultajn gramatikojn kaj kelkajn vortarojn.

Solvo 4

Oni forigus la primitivajn adverbojn *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre*, kaj *volonte* el la gramatiko. Aliparte la radikoj *nepr*, *oft*, *parker*, *precip*, *spit*, *supr* kaj *volont* estus difinitaj en la vortaroj kiel adjektivoj, substantivoj aŭ verboj, laŭ la kazo.

Tiel, oni havus la vortojn *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre* kaj *volonte* kiel derivitajn adverbojn.

La plej bona solvo

Laŭ mi, ĉi tiu lasta solvo estas la plej kohera, regula, logika, konsekvenca kaj simpla.

Ja oni bezonus modifi, mi kredas, ĉiujn gramatikojn kaj ĉiujn vortarojn, rilate al tiuj sep vortoj.

Sed mi opinias, ke valoras fari tion. ■

ĈU KARAKTERIZA FINAĴO



ĈE

PRIMITIVAJ ADVERBOJ?

Tiu demando staras supre de artikolo, kiun el Brazilo ĉirkaŭsendis Cleber Lemos, koncerne sep vortojn iusence netipajn : *nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre kaj volonte*.

Unue li mencias, ke en Esperanto ekzistas du specoj de adverboj, nome la primitivaj – puraj radikoj – kiel *nun, hodiaŭ, plus* kaj *tro*; kaj la derivitaj kun la karakteriza finaĵo *-e*, ekzemple *flue, ĝoje* kaj *obstine*. Tio kompreneble estas laŭ la klasifiko de ankaŭ la *Plena Analiza Gramatiko* (PAG : p. 117).

Tiam Lemos tuŝas la problemecon de la sep vortoj cititaj en la ĉi-supra unua alineo. Kvankam troviĝas ĉe ili la finaĵo *-e*, ili estas laŭ li adverboj ne derivitaj sed primitivaj. Ĉu vere?

Post *nepre, ofte, precipe, spite, supre, PIV* uzas la mallongigon *adv.*, kvankam ne post *parkere* kaj *volonte* (kio tamen eble konsistigas simplan preterpason). Do tiu grava vortaro – apoge sur la lingvo-uzado – klasas tiujn vortojn kiel adverbojn, ne indikante devenon el radikoj. Ion similan, kvankam ne identan, faras ankaŭ la Universala Vortaro (*Fundamento de Esperanto*). Mi citas el ĝi rilate al tri lingvoj kiujn mi konas, la Franca, la Angla kaj la Germana :

nepre/ tout à fait | throughout | durchaus.

oft/ souvent | often | oft.

parker/ par cœur (de mémoire) | by heart, thoroughly | auswendig.

precip/ principalement, surtout | particularly | besonder, vorzüglich.

spit/ en dépit de | in spite of | zum Trotz.

supr/ en haut | upper (adj.) | oben.

volont/ volontiers | willingly | gern.

Kaze de ĉi formoj ne dubindas la adverbeco, malgraŭ la unuopa indikaĵo (*adj.*) post *upper*. Pri la kategorieco de la radikoj en la Fundamento PAG diras : «*Krom la tri supraj ĉefaj kategorioj [la substantiva, la adjektiva kaj la verba] ni povas distingi ankoraŭ kvaran, la kategorion adverban. Ekz-e, subite, nepre estas nevole imagataj en adverba funkcio (p. 375).*»

Ĝis tiu punkto Lemos certasence pravus. Sed ĉu vere, ke pro la indikoj de adverbeco *nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre* kaj *volonte* estas primitivaj adverboj?

Tamen ne. Notendas, ke en la Fundamento neniu el tiuj havas la finaĵon *-e*. Temas pri *radikoj* adverbaj. Sed tio ne pruvas per si mem, ke tial ili povas esti, senplue, ankaŭ vortoj. Ne, estas bezonata la almeto de *-e*, kiun oni povas ankaŭ preterlasi kaj anstataŭigi per *-a, -o* ktp.

Nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre kaj *volonte* do montriĝas ne adverboj primitivaj sed derivitaj (t.e. kunmetitaj), kio konsistigas gravan, se subtilan, distingon. Tamen veras, ke la koncernaj radikoj laŭ la Fundamento apartenas gramatike al la kategorio adverba, kio estas netipa; ĉar ĝenerale la *e*-adverboj kreiĝas el radikoj alikarakteraj.

PAG klarigas, ke «*adverbo kaj adjektivo ja havas funkcion saman . . . Tion montras, ke, formante substantivon el verbo, adjektivo aŭ adverbo, ties adverbo fariĝas adjektivo : rapide kuri – rapida kuro; tuj veni – tuja veno; tro varme – troa varmo. La adverbo do estas plie morfologia-sinetia ol vortfarada kategorio.*» Sekve «*el la vidpunkto de pluformado kaj vortfarado, ĉi tiu kvara kategorio [la adverbeco de la radika areto aludita] estas neglektebla, ĉar la vortoj kaj radikoj al ĝi apartenantaj kondukas ĉe la vortfarado kiel radikoj adjektivaj.*» (Sampaĝe)

Tio tamen ne metas finan punkton al la diskutado, ĉar post 1905 – kiam la Esperantistaro akceptis la Fundamenton – okazis evoluo rilate la diskutatajn formojn, kiel evidentiĝas per la *Baza Radikaro Oficiala* (BRO). Ĝi prezentas ĉi ĉiujn, kun la ŝajna escepto de *oft/* kaj *parker/*, sed alimaniere en komparo kun la Fundamento. Temas, fakte, pri tri diferencoj.

Unue, BRO ne indikas ilin kiel radikojn, sed ekipitajn per finaĵoj. Due, ili ne aperas kiel adverboj. Okazis adjektivigo : *nepre* (6), *precipa* (4) kaj *volonta* (6). (La ciferoj interkrampaj indikas la ofteco-grupojn). Sed, trie, tio ne kompletas; ĉar *spiti* (9) estas verbo kaj *supro* (4) substantivo. Tiel do statas la afero aktuale.

Lemos en sia cirkulero prezentis kvar eblajn solvojn por la problemo, kia li ĝin komprenas. Ili jen, kun miaj komentoj :

1. Difini tiujn sep primitivajn adverbojn kiel "specialajn primitivajn adverbojn kun karakteriza finaĵo".

Ĉi procedo alportus neniujn formoŝanĝojn. Oni daŭre dirus kaj skribus *ofte, ofta, ofto, ofti* ktp. Sed la vorto *speciala* signifas, ke ni agnosku notindan

escepton en lingvo alie regula.

Tio ne akceptindas, kaj ne necesas; ĉar — kiel montrite — temas ne pri adverboj sed pri radikoj origine adverbaj.

2. *Oni difinus "nepr, oft, parker, precip, spit, supr kaj volont" kiel primitivajn adverbojn.*

Tion Lemos mem prikomentas tiele: «la plej granda malavantaĝo de ĉi tiu solvo estas ke oni havus kelkajn vortojn preskaŭ neprononceblajn.» Sed efektive, troviĝas en ĝi malavantaĝo eĉ pli granda, nome reformisma lingvoŝanĝo. Tio estas tute neakceptinda, kaj feliĉe ankaŭ sensanca. Ni rajtas, kaj iufoje devas, adapti niajn difinojn — por plikonformigi ilin al Esperanto — sed ne inverse, kio estus lingvistike nedefendebla.

3. *Oni daŭrigus difini tiujn sep vortojn kiel primitivajn adverbojn kaj kohere oni derivus: "nepreo, oftea, parkerei" k.s.*

Ĉi tio havus la saman malavantaĝon kiel "solvo 2": neakceptindaj ŝanĝoj reformismaj de ekzistantaj vortoj, kiuj restu neatencataj. Tiuj sep vortoj ĉiukaze ne estas primitivaj adverboj.

Ndir : Ankaŭ priatentinda, jen debato bone prezentita de S-ro Cleber Lemos kaj Kolego Edwin de KOCK : ĝi rekte koncernas la gramatikan sekcion kaj la sekcion pri ĝenerala vortaro; ja ne estas dubo, ke tiuj sekcioj interesiĝos pri tia temo. (JT)

Atentigo : La enkonduko al BRO (Aktoj de la Akademio, II : p. 37), en sia ĉapitro A. *Kategorieco de la radikoj*, ŝajne sugestas, ke pliaj elementoj devas enveni en tiun debaton.

Unue, resendante al la Konstatoj (Aktoj de la Akademio, I), ĝi asertas, ke "la *Universala Vortaro kaj ties Oficialaj Aldonoj ne estis redaktitaj kun la celo fiksi la signifokategoriojn de la radikoj*". Alidire la celo de tiuj dokumentoj estis ĉefe semantika : ili fiksis la signifon de la vortoj per komparo al diversaj lingvoj. La kvin tradukoj de UV ne ĉiam estas koheraj inter si kaj kelkfoje oni trovas

4. *Oni redifinu "nepr, oft, parker, precip, spit, supr kaj volont" adjektive.*

Nu, io tia jam okazis, kiel indikite, laŭ la *Baza Radikaro Oficiala*, kiu prezentas Akademian aprobon.

Cleber Lemos prave skribis, ke «ĉi tiu lasta solvo estas la solvo plej kohera, regula, logika, konsekvenca kaj simpla.» Pro tio li gajnas gratulon, kvankam li atentis, ke la koncernaj vortoj neniame rolis kiel *primitivaj adverboj*. En la Fundamento ili estis *radikoj* adverbaj, kvankam nuntempe ili prezentigas alimaniere : kun karaktero adjektiva, verba aŭ substantiva, kio pli oportunas por la vortfarado.

Fine eblas per unu frazo respondi al la demando per kiu komenciĝis tiu ĉi artikolo : nel Ĉe primitivaj adverboj ne ekzistas karakteriza finaĵo.

La finaĵo -e ĉiam signalas nur adverbecon derivitan, t.e. per kunmetado (de radikoj kun finaĵo).

kategorian diferencon inter ili.

Due, la radikoj de BRO estis submetitaj al sisterna ekzamenado, el kiu rezultis, post eventuala debato kaj post fina voĉdonado de la Akademio, fiksado de la kategorioj. — Tiel kaj tial, oni trovas en aliaj kategorioj ol la adverba la plej multajn el niaj sep radikoj : *precipa* (4), *nepra* (6), *volonta* (6), *spiti* (9), *supro* (4). La ne sufiĉe ofta *parkere* tute ne aperas en BRO. Tamen ofte apartenas al la dua ofteco-grupo de BRO : pro preskoboldo ĝi elfalis el la edlonaĵo de 1975. Korektita eldono de BRO ekzistas manuskripte; ĝi entenas alfabetan liston kaj eraro-listeton.

Konklude : la kvara "solvo" de Cleber Lemos estas taŭga; la Akademio elektis ĝin kaj oficialigis ĝin antaŭ 1975. Vortaroj nur sekvu!

A. A.

Kian komputoron aĉeti?

(fino de p. 8)

la ĉapelaj literoj ne aperas, iel estas maskitaj. Efektive ili reprezentas nur proksimume iom pli ol du procentoj de kiu ajn teksto. Via korespondanto rapidigos vian taskon per anonco redaktita jene : *la 12 literoj estas : ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ kaj Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ, Ŭ!* Vi legos 12 aliajn literojn aŭ signojn sed komprenos lian me-

saĝon. Se li ne donas tian mesaĝon, vi tamen elturniĝos! Ekz-e, &iu povas esti nur ĉiu!

Oni diversflanke proponas uzi la *h-alfabeton de la Fundamento* (ch, sh, . . .); aliaj preferas la *x-alfabeton* (cx, sx, . . .). Sed la avantaĝo ne estas granda por simpla komunikado, ĉar vi devos fari ĝuste la samajn 12 operaciojn, se vi volos ricevi tekston kun ĉapelaj!

Mat y Mat

Plena Pekoteko 1985-1990

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en tri volumoj (kun entute pli ol 1 800 paĝoj) la nocio-kompleksoj registritaj inter 1985 kaj 1990 en kadro de la *per-komputora termi-*

no-kolekto.

Prezo : 80 Usonaj dolaroj + sendokosto. Mendu ĉe R. Eichholz, Esperanto-Press, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL IBO.

Kian komputoron aĉeti? (3)

Eble vi deziras korespondi per poŝta sendo de disketoj aŭ per telefona sendo de viaj registraĵoj? Vi volas vivi kun la rimedoj de via tempo.

Tuj altrudas sin la demando de niaj Esperanto-literoj. Vi jam solvis la aferon por via propra uzado. Sed ne evidentas, ke alia komputoro povos legi vin! Efektive estas pluraj diversgravaj obstakloj.

Plej unue la disketoj estas de du ĉefaj grandoj: estas disketoj de 3.5 inĉoj (Usonaj coloj), aŭ de 5.5 inĉoj. Via korespondanto kaj vi elektu saman grandon. Se ne eblas, restos al vi nur la pertelefona sendo. Pri tio ni eble iam parolos: tio postulas "modemon" minimume!

Due se via korespondanto disponas pri ĝuste la sama instalaĵo (t.e. sama komputoro, sama mensvaro), kiel vi, ne restas esenca problemo: vi povas fide sendi al li disketojn; li legos ilin sur sia ekrano ĝuste kiel vi, se li uzas samajn kodojn por Esperanto-literoj! Sed tio ne estas tre grava. Vidu pli poste.

Se via korespondanto havas alian komputoron aŭ mensvaron ol vi — plej ofta kazo — vi ne povos sensanĝe uzi vian registraĵon. Via mensvaro efektive, krom la karakteroj, registris aliajn aferojn, kiel ekz-e, alineadon, ŝanĝon de stilo (rektaj, kursivaj, ktp.) aŭ ŝanĝon de la tuta karakteraro mem (*Script, Prestige, Time* . . .). Tiuj aliaj registraĵoj estas propraj al via mensvaro kaj estas objektoj de

nenia normigo. Ili donus nur misordon kun alia mensvaro. Tial vi devas "savi" vian tekston laŭ ASCII: tiu operacio forviŝas el via registraĵo ĉion, kio ne apartenas al la kodaro ASCII; tiam ĝi estas legebla de kiu ajn alia mensvaro.

Sed ĉar la Esperanto-literoj ne apartenas al ASCII-kodaro, ankaŭ ili iel malaperas. Tamen vi nepre donis al ili iujn kodojn apartenantajn al la 256-faka tabelo de ASCII (kompletigita). Do ili transrestas, sed ne aperigos Esperanto-literojn sur la ekranon de via korespondanto. Ĉio dependas de la komparo de ambaŭ mensvaroj (la via kaj tiu de via korespondanto) kaj de la ASCII-lokoj (kodoj), en kiuj kuŝas tiuj literoj! Sekve anstataŭ, ekz-e, ĉ via korespondanto povos legi kiun ajn signon, kiu en lia mensvaro troviĝas kun la sama kodo; eĉ povos aperi nenio, se okazas, ke tiu via kodo ne estas uzata ĉe via korespondanto, t.e. respondas al neniu karaktero nek signo. Ekz-e, ĉ kaj ĝ de mia mensvaro ŝanĝiĝas al *alfa* kaj *beta*, se mi ŝanĝas mian karakteraron *Zamenhof* al la karakteraro *Dutch*. Okazos simile kun difinitaj mensvaroj de iu IBM-kongrua instalaĵo.

En ĉiuj kazoj necesos, ke vi transformu koncerne la Esperanto-literojn la kodojn de via korespondanto al la viaj. Sufiĉe multaj mensvaroj havas programon de anstataŭigo de vortoj aŭ de vortpartoj al aliaj: sufiĉos elfari 12 operaciojn, po unu por ĉiu Esperanto-litero. Ekzemple, la unua operacio estos ŝanĝi ĉiujn *alfa* al litero *ĉ*! Cetere vi jam povas diveni tekston, eĉ se

Finon vidu sur p. 7.

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — *Redaktoro*: Jean THIERRY. — *Direktoro de la publikaĵo*: André BOURDEAUX. — *Presejo*: COCONNIER, 72300 SABLÉ. — *C.P.P.*: n-ro 6971. — *Prezo*: 1 n-ro: 40 FRE — *Jara abono*: 120 FRE — *Pagebla*: ĉe kontoj: Banka: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝteka: 735 27 B Paris. — UEA: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag): nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

Perantoj por diversaj landoj:

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta): S-ro UMEDA Yosimi, LPO.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Beneluxo: Eldonejo kaj Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B 2610 WILRIJK, Belgio. PĈK 000-0152140-44. — Kreditkartoj EUROCARD, MASTERCARD aŭ VISA: sciiĝu numeron kaj validperiodon. Ne forgesu subskribi. Jarabono: 880 BEF [Telefono + Telefax: (32) 3. 827. 24. 05.]

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo: ScS Ed Jockey Club — Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio: S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D W 4790 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko: S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Svedio: Sveda Esperanta Federacio: c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono: Eldonejo Bero: PO.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono (23 \$).